

## La 9an de decembro 2013

### Japanio komencis ekpaŝi laŭ vojo al pereco

#### Danĝero de « Leĝo por protekti specifajn sekretojn »

La 6an de decembro « Leĝo por protekti specifajn sekretojn » estis aprobita de la regantaj Liberara Demokratia Partio (LDP) kaj la koalicia partio Koomei. Per tiu ĉi leĝo la ministroj rajtos difini “specialajn kaŝendaĵojn” en kvar kampoj, nome defendo, diplomatio, terorismo kaj spionado, kiel « specifajn sekretojn ».

Preskaŭ ĉiuj amaskomunikiloj, ĵurnalistoj, esploristoj, advokatoj, verkistoj, pacaj kaj virinaj organizoj kaj pli ol duono de la enketitaj popolanoj kontraŭis tiun leĝon, ĉar la difino “sekreto” ne estas klara kaj eĉ kio estas sekretoj estos sekreto. Ili timas, ke la registaro kaj sekve la polico povos kateni liberan agadon de la popolanoj laŭ sia volo, kaj dank’ al tiu leĝo denove venos malluma socio, kaj sekve okazos milito same kiel antaŭ la dua mondmilito.

Dume la ĝenerala sekretario de LDP Iŝiba skribis en sia *twitter*, ke manifestacioj, kiuj okazis ĉiun tagon ĉirkaŭ la parlamentejo kun granda bruo, estas same kiel terorista agado. Tio klare montras, ke eĉ pacaj manifestacioj povos estis malpermesitaj kaj la partoprenantoj estos arestitaj.

Ial la registaro insistis aprobigi tiun leĝon. La ĉefministro Abe celas igi Japanion “ordinara regno, kiu havas rajton militi kaj fakte povas militi, sekvante la ordonon de Usono”. Li estas tre danĝera homo, sed en la lasta decembro la japana popolo elektis tiun partion, nome tiun homon, tro malesperinte pri la antaŭa registaro de Demokratia Partio.



### **Manifestacio kontraŭ la Leĝo por protekti sekretojn**

Tiu leĝo temas ankaŭ pri nukleaj aferoj. La registaro povos difini informojn rilatajn al nukleaj aferoj kiel specifajn sekretojn, ĉar protekti nukleajn centralojn kontraŭ teroristoj kaj spionoj estas gravaj kaj ĉar nukleaj aferoj grave rilatas al la diplomatio kaj defendo de Japanio. Eĉ nun la registaro kaj TEPCO provas kaŝi plej multajn informojn al la popolo, do se tiu leĝo efektiviĝos, ni povos esti ne informitaj. Ili povos kaŝi informojn pri grava akcidento kaj tralikiĝo de poluita akvo, sekve nenion sciante, ni povos elmetiĝi al radioaktiveco kaj riski nian vivon.

### **Nukleaj aferoj ne estu sekretoj**

La 11an de novembro 2013 en la ĵurnalo Fukuŝima-Minpo aperis artikolo pri s-ro Naka Jukiteru, 72-jara inĝeniero, kiu okupiĝas pri nukleaj centraloj de 40 jaroj. Mi tradukos ĝin :

Lia kompanio havas 40 dungitojn, el kiuj 4 laboris en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, kiam okazis tiu akcidento.

La registaro diras, ke apartenos al “specifaj sekretoj” ja planoj por gardi la centralojn, sed ne la konstruplano de reaktoroj kaj informoj pri akcidentoj, sed multaj timas, ke pli kaj pli multaj informoj apartenos al la specifa sekretaro.

S-ro Naka diras : « Antaŭ la nuklea akcidento en Fukuŝima eldiri dubon pri la sekureco de la centraloj estis tabuo, sekve naskiĝis mito pri sekureco de la centraloj kaj kutimo kaŝi akcidentojn kaj problemojn, kaj fine okazis

tiu granda akcidento ».

Dum laborado, laboristoj vidas kaj scias akcidentojn kaj problemojn. « Se la leĝo difinos nukleajn aferojn kiel sekretojn, tio timigos inĝenierojn kaj laboristojn, tiel ke ili ne povos eldiri verajn aferojn, kaj sekve sekureco estos atencita. La popolanoj havas rajton havi ĝustajn informojn pri nukleaj aferoj, ĉar tiuj rekte rilatas al vivo ».

Laŭ la leĝo, se publikaj funkciuloj kaj rilataj kompanianoj malkaŝos sekreton, ili estos kondamnitaj al maksimume 10 jara punlaboro. Nun en la centralo n-ro 1 multaj laboristoj sincere laboras por la riparado.

« Multe da ili estas junaj laboristoj el Fukuŝima kaj ili dediĉas sin kun misio, ke ili rekonstruu sian hejmurbon. Mi timas, ke ili perdos tiun fortan motivon, se ili estos suspektitaj pro ‘malkaŝo de sekretoj’ ».

En lia kompanio pli kaj pli multaj laboristoj jam superis limon de la elmetiĝa normo, kaj eklaboras en alia kampo. « Jam en la centralo mankas laboristoj, kaj sekve teknika nivelo malaltiĝis. Kiel teni laboristojn estas la plej grava problemo en la nuklea industrio. Se la leĝo katenos nin, pli malfaciliĝos varbado de laboristoj ».

Li diras, ke la plej utila rimedo kontraŭ teroristoj estas plifortigi barilojn, instaligi gvatfotilojn kaj metalditektilojn ktp. « Tiu leĝo povos influu la planon por ferĵetado de la nuklea centralo n-ro 1 kaj ankaŭ refunkciigo de reaktoroj. Ni devas pli multe diskuti pri tiu leĝo ».

Bedaŭride, kontraŭ la timo kaj deziro de s-ro Naka la leĝo estis aprobita sen sufiĉe da diskuto. La 6a de decembro 2013 povas esti la tago de ekpaŝo al pereco de Japanio, temante pri demokratio kaj ankaŭ pri sekureco de nukleaj centraloj.

### **Nuligo de « Nuligo de nukleaj centraloj »**

En la sama tago, la 6an de decembro 2013, la ministerio pri ekonomio kaj industrio publikigis krudan planon pri la nova energiplano. Post la nuklea akcidento en 2011, tiama registaro de Demokratia Partio decidis nuligi ĉiujn reaktorojn ĝis la jaro 2040, sed post la granda venko de sia partio Liberala Demokratia Partio en la lasta decembro la ĉefministro Abe jam deklaris rekonsideron pri tiu energipolitiko de la antaŭa registaro.

Resumo de tiu nova energiplano estas jene :

« Per nuklea energio oni povas liveri elektron tre stabile kaj efike,

produktokosto de elektro estas malalta kaj ne multe ŝanĝiĝas, kaj samtempe dum la funkciado nukleaj centraloj ne eligas gason varmigan al la terglobo. Pro tiuj kialoj nuklea energio estas grava, baza energifonto, kiu subtenas stabilan sistemon de konsumo kaj livero de energio ».

« Surbaze de sukurega funkciado de nukleaj centraloj Japanio daŭre uzos nuklean energion ».

Tute stultaj estas la registaro kaj la industria mondo. Ili tute ne lernas de la leciono de Fukuŝima. Ili ankoraŭ kredas kaj kredigas al ni, ke elektro produktita per nuklea energio estas malmultekosta kaj elektroproduktado per nuklea energio ne damaĝas la medion. Ili tute ne respondas al nia demando pri tio, kiel forĵeti uzitajn nukleaĵojn. Se daŭros la nuna registaro, povos okazi la dua Fukuŝima, kaj eĉ se ne, Japanio fariĝos neloĝebla lando, kie minacas vivon montegoj da danĝeraj nukleaĵoj.

**HORI JASUO**